# Kiel iri al... ?

| | |
|---|---|
| **Celo:** | por ekzerci esprimojn rilate la direktojn, esprim- kaj komprenkapablon. |
| **Celgrupo:** | komencantoj |
| **Antaŭpreparo:** | Folioj A aŭ B; por ĉiuj: C kaj mapo (vidu sube) |
| **Tempo:** | 10 – 25 min. |
| **Ludantoj:** | minimume 2 |

Antaŭ ol komenci la ludon ni konsilas grupe kolekti la nomojn de konstruaĵoj, instutucioj de urbo, esprimojn rilate al orientiĝo en urbo, kaj demandojn pri helpopeto, vojindiko. (Vidu la folion C.)

**La ludo:**

La ludantoj po paroj sidiĝu dorse, aŭ iom forturniĝante unu de la alia.
Ĉiu ricevu folion kun la mapo, aldonaĵon C, kaj alterne ĉu B ĉu A folion.

La taskoj praktike estas jam skribitaj sur la folioj – unu interesiĝas, la alia respondas, poste inverse. Ili prefere ne vidu la mapon (kaj tekston) de la alia.
Komence la instruisto mem, kun kapabla lernanto prezentu la taskon.
Plifaciligas la taskon, se kaj la demandanto kaj la respondanto sekvas per senpinta skribilo la indikotan/indikitan vojon, por ne erari.

Krom la supre indikita celo ĝi estas bona ekzerco por atenti la aliajn, kaj ankaŭ por pli facile lerni la nomojn de komunaj konstruaĵoj en urbo.

# C – folio (ricevas ĉiu lernanto)

**En viaj demandoj uzu la esprimojn**

Bonan tagon, ĉu vi povus diri al mi, kie estas…?
Ĉu mi povas vin peti diri al mi …?
Ĉu vi scias…?
- kiel iri al la…?
- kiel atingi la …-on?
- kiel mi iru al…?
- kiel mi trovos la …-on?
- kie troviĝas la …?

Pardonu, sinjorino (sinjoro) pro la ĝeno,
Ĉu vi povus helpi al mi? Mi deziras iri al….
Mi petas vin diri, kiel mi iru al…

**Kaj ricevinte la klarigon, ne forgesu danki tion!**

Dankon!
Mi multe dankas vin (pro via klarigo/pro via komplezo)!
Mi tre dankas al vi vian (afablan) helpon!
Dankon, vi estas tre ĝentila!

Ĝis revido! Ĉion bonan!

**En viaj respondoj uzu la esprimojn**

Iru rekten!… poste turnu vin…. poste turniĝu maldekstren (dekstren)!….
Bonvolu iri…! Iru preter la … !
Dekstre (maldekstre) vi vidos …-on, iru preter ĝi!
Turniĝu dekstren (maldekstren) ĉe la … sekva / dua / tria strato / stratangulo!
Poste iru … al / ĝis … !
Iru ĝis la fino de la strato, kaj poste… ! … Tuj turniĝu …!
Iru ĝis la … kaj poste turniĝu …
Trairu la straton ĉe la ….
Vi trovos la …-on ĉe la… / apud la … /

**Estu ĝentila!**

Kompreneble! Memkompreneble! Volonte! Nedankinde!

| | |
|---|---|
| dekstre | trafiklampo |
| maldekstre | stratangulo |
| rekte | funde de la strato |
| sekva | trotuaro |
| lasta | trapasejo, zebro |

# A – folio (ricevas ĉiu dua lernanto)

Vi estas ĉe la stacidomo, kaj volas iri al la

a) policejo
b) hotelo
c) monumento
ĉ) muzeo
d) ponto
e) taksihaltejo
f) fontano
g) loĝkvartalo
ĝ) kinejo
h) teatrejo

Trovu ĝin per la helpo de via najbaro!

**KLARIGOJ por la mapo:**

1) urbodomo
3) preĝejo
5) kafejo
7) parko
9) turisma oficejo
11) parkejo
13) rivereto
14) biblioteko
17) antaŭurbo, suburbo
19) lernejo

## B – folio (ricevas ĉiu lernanto kiu ne ricevis la A-folion)


Vi estas ĉe la stacidomo, kaj volas iri al la

a) urbodomo
b) preĝejo
c) kafejo
ĉ) parko
d) turisma oficejo
e) parkejo
f) rivereto
g) biblioteko
ĝ) suburbo
h) lernejo

Trovu ĝin per la helpo de via najbaro!

**KLARIGOJ por la mapo:**

2 policejo
4 hotelo
6 monumento
8 muzeo
10 ponto
12 taksihaltejo
14 fontano
16 loĝkvartalo
18 kinejoteko
20 teatrejo


STACIDOMO
P
TAKSIO
1
2
3
4
5
6
7
8
9
10
11
12
13
14
15
16
17
18
19
20